21.12.07

FERVOJA ESPERANTISTO

Informilo de Germana Esperanta Fervojista Asocio

Mitteilungsblatt der Deutschen Eisenbahner-Esperanto-Vereinigung in der Stiftung Bahn-Sozialwerk

Fondita 1952 | Numero 4 | Oktobro/Decembro 2007



Lok 01, 1968, Bw Kassel

Foto: Volker Spieth

Nia 51-a Jarkunveno

Nia 51-a jarkunveno okazis en Bad Elster. De la 26-an ĝis la 28-an de oktobro 2007 kunvenis pli ol 30 (aŭ nur?!) GEFA-anoj kelkaj kun familianoj en la ŝatata saksa kuracloko en Vogtland. Inter la gastoj estis ankaŭ po unu E-ino el Belgio kaj Bulgario.Jen, ĉiuj de ili ne timis la longan vojaĝon al la trilanda angulo Saksio-Bavario-Ĉeĥio/Bohemio por travivi agrablan semajnfinon inter (iamaj) gekolegoj kaj konatiĝi kun supera Vogtland.
La vendredan vesperon estis prezentita al ni pere de lumbildprelego Bad Elster mem kaj la venontan matenon oni povis rigardi dum urbo-rondirado, kiun prezentis la preleginto. Sed kiel kutime, la estraranoj devis kunsidi samtempe por pritrakti la asociajn taskojn kaj problemojn, kies ĉefa temo pli kaj pli estas la malkreskanta membronombro de GEFA kaj la pluvivo de ĝi!
Jam la vendredon posttagmeze informis D-ro Hoffmann detale la GEFA-estraron pri la grava laboro de la Terminara Komisiono de IFEF, kies sekretario li estas.
La sabatan posttagmezon ni konatiĝis kun la pli vasta ĉirkaŭaĵo de Bad Elster dum la "eta Vogtland-rondveturo". Ni vizitis resp. traveturis i.a. la lokojn Markneukirchen-Klingenthal, tio estas la t.n."muzik-angulo", ni preterpasis la Aŝberg-skisaltejon kaj Schöneck. Vere amuza kaj interesa estis prezentado kaj funkciigo de mekanikaj muzikinstrumentoj en "Hüttl-muzeo". Post la deviga kafopauzo ni reveturis al nia BSW-hotelo Weiße Elster".
La vesperan kulturan programon malfermis la GEFA-prezidanto. Komence li petis ĉiujn je silenta memoro honore de mortintaj membroj.
Sekvis "Vogtlanda vespero", iomete ni lernis tipajn regionajn idiomojn (Mundart) kaj finfine ni povis danci. La dancado estis nur interrompita de lerte prezentita tombolo de nia diino de fortuno Claudia kaj de sprita moderatoro Bodo.Ĉiu ricevis iun bezonatan aŭ ne bezonatan premion. Ankaŭ menciinda estas la de Manfred Retzlaff en Esperanton tradukitan kanton, kiun ĉiuj kunkantis.
Kvankam kelkaj forlasis la dancsalonon sufiĉe malfrue, startis matene nia autobuso matene al Plauen, kie ni konatiĝis dum mallonga rondveturo kun la metropolo de Vogtland. La plimulto vizitis ankaŭ la "Spitzenmuseum", kiu prezentas la mondfaman Plauener Spitze (Plauena brodaĵo).
Tagmeze startis la plej multaj partoprenintoj (jk-anoj) hejmen, espereble kontenta pri la tagoj en ĉarma Vogtland.

La venonta jarkunveno okazos de 10. ĝis 12.10.2008 en Bad Tölz/supra Bavario.
Enscribu tiun-ĉi daton jam nun dika en vian kalendaron!

AME



Spitzenmuseum: Stickautomat bei der Arbeit
Foto: Bodo Ehrlich

La Jarkunveno el alia vido

Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA) okazigis ankaŭ en tiu ĉi jaro sian tradician jarkunvenon. Inter la 26a kaj 28a de oktobro 2007 la fama kuracloko Bad Elster, proksime al la ĉeĥa landlimo, kore akceptis siajn GEFA-gastojn. La semajnfina kunveno okazis en la feria hotelo Weiße Elster, kiu apartenas al la Fervoja Sociala Fondaĵo (BSW). Regis amika etoso inter la alvenintoj, kiam vespere ili rigardis per diaprelego la elegantan kuraclokon Elster kaj la ĉirkaŭn regionon, Bad Elster estas konata de longtempe kiel fama banloko kaj riĉa de tradicioj depost la 19a jarcento.

Dum la laborkunsido venonttage la GEFA-estraro sub gvido de la GEFA-prezidanto Achim Meinel traktis multnombrajn tempojn de la tagordo kun la GEFA-komisitoj. La aliaj GEFA-anoj kaj gastoj esploris la belegan kuraclokon kun la elegantaj konstruaĵoj precipe el la 19a jarcento. Post komuna tagmanĝo en la BSW-hotelo startis aŭtobuso por la ekskurso al la montara ĉikaŭaĵo. En la vilaĝo Wohlhausen-Markneukirchen invitis privata muzeo pri aŭtomataj muzikinstrumentoj. Ne mankis la sekva rondo kun kafo kaj kuko. Dum la vespero, en la BSW-hotelo, allogis popolara muziko al gaja dancvespero akompanita de senkosta loterio kun ĉarmaj gajnaĵoj. La sekvan dimanĉmatenon altiris GEFA-anojn kaj aliajn gastojn prezentado de diapozitvaj pri la beleco de la regiono. Kun agrablaj memoroj pri la plene sukcesinta renkontiĝo la partoprenintoj adiaŭis kaj reveturis per la Vogtland-fervojo al la stacio Plauen.

Elkoran dankon al la organizintoj de la tiujara kunveno de GEFA. W. Barnickel

Veraj pioniroj de la fervojo: La laboristoj.

Estas strange. Legante en historiaj raportoj aŭ libroj pri belaj kasteloj, grandaj katedraloj, signifoplenaj konstruaĵoj aŭ fortikaĵoj kun dikaj muroj, unuavice estas menciitaj nur ties konstruigintoj, konstruestroj aŭ mondonintoj. Preskaŭ neniam vi legas ion pri tiuj homoj, kiuj ofte en vera senco de vorto, sub mizeraj kondiĉoj laboris por realigi tiujn signifoplenajn kaj belajn konstruaĵojn, nome la laboristoj.

Tio ankaŭ validas por la evoluigo de fervojo. Multe estis skribataj pri „fervojaj pioniroj", ekz. pri *Friedrich List*, *Joseph von Baader*, *Carl Anton Henschel*, *Friedrich Harkort* kaj aliaj. Sed nomojn kiel malgrandkamparano *Terjung*, taglaboristoj *Hollmann*, *Uhlenkott* aŭ *Kennewitz*, vi serĉas vane.

La laborintensiva kaj korpe alte postulanta laboro de fervojkonstruo donis en la 19-a jarcento laboron al multaj, en siaj ekzistadoj minacataj homoj. Donis laboron al maldungitaj taglaboristoj, servistoj, kamplaboristoj, sed ankaŭ al metiistoj kaj malgrandkamparanoj. En Silezio (*Schlesien*), Saksio (*Sachsen*) kaj Vestfalio (*Westfalen*) anoncis sin por tiu traklaboro ankaŭ multaj, en amasmalriĉeco vivantaj teksistoj kaj ŝpinistoj. Multaj loĝis en malproksimaj vilaĝoj kaj akceptis longajn vojojn al la laborloko. Virinoj el proksimaj vilaĝoj estis dungataj kiel diligentaj laboristinoj, sed ili ricevis por la sama laboro kiel tiu de viroj, principe pli malmultan laborpagon. El tiuj menciitaj, nur de tempo al tempo okupitaj laboristoj, diferenciĝis en la kuranta 19-a jarcento la ĉiam pligrandiĝanta nombro de sezon- kaj migradlaboristoj. Disŝiritaj el siaj tradiciaj komunumaj kaj familiaj asocioj, ili migris multajn jarojn de unu fervojlinio al aliaj kaj akceptis limigitajn laborkontraktojn. Pro iliaj lertecoj estis aparte tre ŝatataj la migradlaboristoj el Silezio.

La labortempon vi bone povas ekkoni el la nombro de la fervojaj laboristoj. La nombro kreskis de 30 000 en la jaro 1841 al 217 000 en 1850, kaj atingis kulminon ĉirkaŭ 1875 kun 541 000 laboristoj.

La laboro de la fervojaj laboristoj estis tre peniga kaj fortoraba. Laboro per maŝinoj tiam estis malofta aŭ eĉ ankoraŭ ne konata. Manlaboro dominis. La konstruo de relvojan subkonstruaĵon okazis per mano kaj per uzo de plej simplaj iloj: pioĉo, hakilo kaj ŝovelilo. Per ili la laboristoj forprenis kaj movis grandajn teramasojn por la planita traceado. Subfoso de talusflankoj por pli rapida gajno de tero estis oficiale malpermesita, sed sub premo de la tempo multe farita. Tio ofte gvidis al falego de tero, ĉe kio laboristoj grave suferis akcidenton, same kiel ĉe eksplodigo de rokoj. Por talusoj kaj viaduktoj oni devis movi vastdistance grandegajn amasojn da tero per puŝĉaroj kaj ĉevalĉaroj. La terŝutado por fervojtaluso okazis en tavoloj, kiujn oni tavolon sur tavolo zorgeme firmpremis. Al la relvoja surkonstruaĵo apartenis la kreado de balasto, la meto de lignaj ŝpaloj kaj la relfiksado. Iu laboristo de la fervojo *Köln - Minden* plendis pri pezaj penegoj: „Se neniu helpos al ni, tiel ni ĉiuj estos kripluloj jam antaŭ ol la fervojo estas preta." Ĉe tiu linio laboristoj devis ŝovi sur longaj vojoj ĉarojn de pli ol kvin funtocentoj kaj porti sur la ŝultroj portaĵojn ĝis unu kaj duono funtocento. Nur sanaj kaj fortaj

viroj eltenis tiun torturon, kiel siatempa raporto menciis: „Kelkaj terenfalis pro peno. Kelkaj devis esti maldungataj, ĉar ili sputis sangon, kaj la korpo ne plu povis elteni tiun strecegan laboron."

La aplikita „popeca pago" (*Akkord-Lohn-System)* ankoraŭ tre pli akrigis la rapidecon de la laboro. Privataj asocioj sed ankaŭ ŝtataj fervojaj administracioj transdonis tutajn traksekciojn al konstruentreprenoj, kaj tiuj pludonis tion al subentreprenoj (*Schachtmeister*). La subentreprenoj gvidis skipojn de 100 ĝis 200 laboristoj, faris kontraktojn por ili, kontrolis ilin kaj ankaŭ pagis la salajron.

Por eble ricevi pli multe da laborpago, la unuopaj skipoj *(Schachte)* laboris laŭvorte la tutan tagon ĝis 14 horoj, nur interrompitaj de manĝo- kaj ripozpaŭzoj. La alto de laborpago ne koncentriĝis je la pezo de laboro, sed unuavice laŭ la loka laborpaga nivelo kaj laŭ la situacio sur la labormerkato. La taga pago sufiĉis nur por elementaj bezonoj. Por ŝpari aŭ eĉ subteni la malproksimajn familianojn, kiel la socialaj reformistoj esperis, ne estis ebla.

La laboristoj loĝaĉis en primitivaj kabanoj kaj estis severe observataj de polico kiel „fremdaj elementoj" kaj „sekurecriskoj". ankaŭ ekster la labortempo. Jure kaj materiale sekuritaj la laboristoj ankaŭ ne estis dum malsano aŭ kiam la vetero ne permesas labori. En Asocio de Germanaj Fervojistoj (*Verband der Eisenbahner Deutschlands*) - fondita en 1887 - apud oficistoj, nur laboristoj de fervojaj stacioj povis estiĝi membroj.

Rolf Terjung – Fonto: „Jubiläumsband 125 Jahre Deutsche Eisenbahn"



Oktobra kanto

Nebulas, falas foliar';
La glason vi plenigu!
La grizan tagon ni al ni
Per vino pliheligu!



Se furiozas ĉio ĉi
ekstere en la mondo,
ne estas detruebla ja,
la bela tera rondo!

Se tremas ankaŭ via kor',
la glasojn vi tintigu!
La ŝtormo ekster nia dom'
Nin ne malkuraĝigu!



Nebulas, falas foliar';
la glason vi plenigu!
La grizan tagon ni al ni
per vino pliheligu!

Aŭtuno regas ĉie, sed
Atendu nur tempeton!
La suno ridos, la printemp'
kreskigos ja floreton.



La bluaj tagoj ekas nun,
ni volas ilin ĝui
la tempo fluas, vane ni
ne lasu ĝin forflui!

Oktoberlied

Der Nebel steigt, es fällt das Laub;
Schenk ein den Wein, den holden!
Wir wollen uns den grauen Tag
Vergolden, ja vergolden!

Und geht es draußen noch so toll,
Unchristlich oder christlich,
Ist doch die Welt, die schöne Welt,
So gänzlich unverwüstlich!

Und wimmert auch einmal das Herz, -
Stoß an und lass es klingen!
Wir wissen`s doch, ein rechtes Herz
Ist gar nicht umzubringen.

Der Nebel steigt, es fällt das Laub;
Schenk ein den Wein, den holden!
Wir wollen uns den grauen Tag
Vergolden, ja vergolden!

Wohl ist es Herbst, doch warte nur,
Doch warte nur ein Weilchen!
Der Frühling kommt, der Himmel lacht,
Es steht die Welt in Veilchen.

Die blauen Tage brechen an,
und ehe sie verfließen,
Wir wollen sie, mein wackrer Freund,
Genießen, ja genießen

Verkita de la poeto Theodor Storm (1817 – 1888)
Esperantigis: Manfredo Ratislavo

Seniorentreffen 2008

Die "Eisenbahner-Esperanto-Veteranen" treffen sich am 23. und 24. April 2008 in Freiburg im Breisgau. Einzelheiten in der nächsten Ausgabe.

Im Internet

Haben Sie einen **PC?**
Wenn ja, auch einen **Internetanschluss?**
Wenn ja, klicken Sie doch mal
http://eo.wikipedia.org an , die E-Version von Wikipedia an.
Sie werden sich wundern, was dort alles zu sehen ist.
Oder www.bsw24.de. Unter den „Freizeitgruppen", **„Esperanto"**.
Auch hier erhalten Sie eine Reihe Wissenswertes.
Ein Versuch lohnt sich.

Erinnerungstafel „Joachim Gießner"

Für die Erinnerungstafel „Joachim Gießner" in Herzberg, die Esperantostadt, haben noch gespendet
Karl-Heinz Marzahn
Kohl – Tommes
Elfriede Kruse.

Herzlichen Dank.

Estis surprizo

Bonegan vinon el la Ratskeller Bremen kaj afablajn bondezirojn mi ricevis okaze de mia 80-a naskiĝtago. Estis ĝojiga surprizo.
"Nome de ĉiuj Germanaj Fervojistaj Esperantistoj". sendis la distrikta komisiito Karl-Heinz Marzahn la bondezirojn.
Mi ĉikune dankas tre kore kaj esperas, ke mi povas ankoraŭ longe resti via fidela membro.

Kun amikaj salutoj via *Dieter Hartig*



Kalendaro

27.12.2007 – 3.1.2008
24a Internacia Festivalo en Düsseldorf HDP@Internacia-festivalo.de

27.12.2007 – 3.1.2008
Internacia Seminario en Würzburg www.esperanto.de

27.12.2007 – 3.1.2008
6. Internationales Neujahrstreffen in Föckinghausen bei Meschede
www.esperantoland.org/nr

❄❄❄